

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1127 (7/2022)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **8009577014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Helpo servo de UEA kaj TEJO responde al la milito en Ukrainio 2
- Puoi dirlo qui 3
- Le donne sono importanti? 3
- Seminario pri pedagogio 4
- Regularo pri Konkurso "Ĝanfranko" 4
- Esperanto kaj arto 5
- Instruu esperanton en Senegalio 6
- Esperantistoj havas propran sanktulon! 6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 8

HELPO-SERVO DE UEA KAJ TEJO RESPONDE AL LA MILITO EN UKRAINIO

Pasintsemajne la mondo en ŝoko atestis la ekeston de milito pro invado en Ukrainion iniciatita de la registaro de Rusio. En malmulte da tagoj la homaro suferis jam multajn mortojn de senkulpaj homoj - interalie infanoj kaj virinoj - kaj pli ol miliono estis forpelitaj el siaj loĝlokoj. Konfirmante siajn deklarojn pri solidareco al ĉiuj, kiuj suferas pro la plago de milito, UEA, subtene de ILEI, kaj nia junulara sekcio TEJO unuiĝis por starigo de helpo-servo responde al tiuj kondamnataj militaj agresoj, kun serioza atento al tio, ke la UEA-reto enhavas la partoprenon de pli ol 240 kontaktoj en Ukrainio. La komuna servo klopodas pripensi, kunordigi kaj efektivigi strategiojn por helpi homojn, precipe esperantistojn kaj ties familianojn. La servo havas kiel principajn celojn:

1. esti centra ejo por akcepti kaj ligi la diversajn helpajn emojn kaj eblecojn en la Esperanto-komunumo, precipe rilate la koncernan militon;
2. aktive kontakti esperantistojn en Ukrainio kaj atenti iliajn situaciojn kaj de ties familianoj;
3. peri sekurajn kontaktojn inter esperantistoj, inkluzive en Ukrainio kaj Rusio;
4. helpi en la komunikado inter homoj helpo-bezonaj kaj homoj helpo-pretaj, respektante kaj garantiante la privatecon de ambaŭ flankoj ĝis la efektivigo de la helpo;
5. meti rifuĝintojn, precipe pro la milito en Ukrainio, en kontakto kun homoj pretaj loĝigi aliulojn;
6. varbi donacojn por la konto Espero;
7. identigi aliajn organizaĵojn kaj iniciatojn kun kiuj eblas kunlabori por similaj celoj;
8. arigi volontulojn kapablajn paroli diversajn lingvojn por helpi en la komunikado kun ne-Esperanto-parolantaj homoj aŭ kun neesperantistaj helpocelaj organizaĵoj kaj iniciatoj;
9. kaj kunlabori kun Landaj Asocioj kaj Sekcioj por la celoj de la helpo-servo.

La helpo-servo funkcias pere de la retadreso helpo-servo@groups.io. Interesatoj helpi en la laborgrupo aŭ informi pri helpo-preteco, ĉu loĝiga, ĉu financa, ĉu alia, povas skribi al tiu adreso. Petoj por la konto Espero por subteno al damaĝitoj en Ukrainio aŭ rifuĝintoj en aliaj landoj, samkiel avertoj pri helpo-bezonaj homoj, precipe esperantistoj kaj ties familianoj, ankaŭ povas esti direktitaj al tiu retadreso. Tiel same konsiloj pri kunlaboro kun jam ekzistantaj neesperantistaj help-iniciatoj. Mesaĝoj senditaj al helpo-servo@groups.io restas plene privataj. Alternative, interesatoj povas rekte kontakti al Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA, respondeca pri Eksteraj Rilatoj, kiu kun TEJO kunordigas la servon, pere de la retadreso fmaiajr@gmail.com.

UEA kaj TEJO jam ekkunlaboras kun individuoj, landaj asocioj, landaj sekcioj kaj neesperantistaj internaciaj organizaĵoj por la celoj de la helpo-servo. Pasporta Servo estos unu el la iloj de la helpo-servo. Por donaci al la konto Espero, oni aliru <https://uea.org/alighoj/donacoj/espero>. La helpo-servo raportos periode pri la evoluoj de la laboroj per la komunikkanaloj de UEA kaj TEJO. Ni agnoskas, ke niaj organizaĵoj ne estas grandaj kompare kun aliaj, tamen ni provas helpi laŭ niaj ebloj per nia organiza forto, kun firma konscio pri la unikeco de Esperanto kaj la valoroj de nia movado.

PUOI DIRLO QUI

Il sito di notizie *Puoidirloqui* ha pubblicato il comunicato del nostro valoroso Massimo Acciai.

L'ISTITUTO ITALIANO ESPERANTO PROPONE IL PROGETTO 30 ORE D'ORO PER L'INSEGNAMENTO DIFFUSO DELL'ESPERANTO NELLA SCUOLA SECONDARIA DISECONDO GRADO E PER UN MIGLIORAMENTO DELLE COMPETENZE DI LINGUA MADRE E LINGUE STRANIERE. Il progetto si basa su numerose precedenti ricerche e sperimentazioni intese a verificare: a) La facilità di apprendimento dell'esperanto a confronto di altre lingue straniere; b) La propedeuticità dell'esperanto verso l'apprendimento di altre lingue straniere; c) La capacità dello studio dell'esperanto di migliorare l'apprendimento della propria lingua madre; d) L'aiuto che l'esperanto offre all'inserimento di ragazzi con dislessia. Il Progetto propone, pertanto, agli studenti delle scuole secondarie di 2° grado, dopo uno specifico aggiornamento dei docenti in attività, l'apprendimento della lingua esperanto in un Corso nelle Classi di 30 ore, che consente di ottenere una conoscenza della lingua al livello A2. Per non rendere necessaria l'assunzione di nuovi insegnanti, si propone di preparare insegnanti già di ruolo o in attività nei singoli istituti, che si rendano disponibili a partecipare al progetto, fornendo loro un corso di formazione veloce, per l'insegnamento di base della lingua, corso che l'Istituto Italiano di Esperanto (IIE) mette gratuitamente a disposizione del progetto. Il corso modulare virtuale, diviso in 10 moduli di 2 ore ciascuno, sarà fruibile online. Al termine delle 20 ore del corso sarà rilasciato un attestato di partecipazione (per 40 ore, comprensivo delle ore di studio individuale e in Meet) valido ai fini dell'aggiornamento e il docente potrà iniziare a tenere i corsi nelle proprie classi. www.30oredoro.it

LE DONNE SONO IMPORTANTI?

In questo momento particolare ricordiamo che a San Pietroburgo, l'**8 marzo 1917**, le donne manifestarono per chiedere la fine della guerra. Scioperando chiesero "pane e pace" e quattro giorni dopo lo sciopero lo zar fu costretto ad abdicare e il governo provvisorio concesse alle donne il diritto di voto.

Ed è quanto mai vera oggi la frase di Virginia Wolf : "**La guerra non appartiene alla storia della donna**" .

Kiel jam tradicie, IEF organizas monatan ZOOM-renkontiĝon.

Partoprenos:

Anna Lowenstein, kiu estis dum jaroj redaktoro de "Sekso kaj Egaleco"

Anna Bennet kiu gvidas internacian esperantan grupon samcelan

Mirejo Grosjean, konata tutmonda aktivulino

Debora Rossetti kiu prezentos la projekton "Mapo de gravaj virinoj", de Sonia Marino, tradukita en Esperanton de Michela Lipari

Marde la 15a de marto je la horo 21.00 - itala horo .

La kunveno okazos per Zoom:

<https://us02web.zoom.us/j/84655281672?pwd=czAwVTQ5bWp2azV3UHlIVzl6ekhmdz09>

ID kunveno: 846 5528 1672

Pasvorto: 517916

SEMINARIO PRI PEDAGOGIO

Ĉu vi estas instruisto, instruanto, instruonto aŭ instruemulo?

IEF kaj IIE invitas vin partopreni en la venonta senpaga reta seminario: PEDAGOGIO DE LA ERARO: de TEORIO al PRAKTIKO.

Ĝi okazos per ZOOM la 19an de marto 2022 de la 15,30 ĝis la 18,30 (UTC+1) fare de Laura Brazzabeni kaj Pedro Aguilar Solà.

Por aliĝi bonvolu plenigi la formularon:

<https://forms.gle/tr4fLaq46fNWb14P6>

Por informoj skribu al: paolamaria.nigrelli@gmail.com

Post la seminario vi povos ricevi partoprenatestilon.

REGULARO KONKURSO "ĜANFRANKO"

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn. La rezultoj estos anoncigitaj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Norberto Saletti, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Michela Lipari, sekretario Norberto Saletti, juĝantoj: Giulio Cappa, Valerio Dalla, Marcella Fasani. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

ESPERANTO KAJ ARTO



Luca Della Robbia, Kantorejo

INSTRUU ESPERANTON EN SENEGALO KUN STIPENDIO (SEPTEMBRO-DECEMBRO 2022)

Kadre de la kampanjo Hans Bakker (<https://uea.org/gk/967>) UEA, ILEI, la Afrika Komisiono de UEA (AK) kaj Senegala Esperanto-Asocio (SEA) alvokas Esperanto-instruantojn de la tuta mondo kandidatiĝi por Esperanto-kurso en Senegalo dum la periodo septembro-decembro 2022. La kurso antaŭos la 8-an Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE), kiu okazos en Tieso (Thiès), Senegalo, de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022. Tamen la kurso mem havos lokon en Dakaro, la ĉefurbo de la lando, 70 kilometrojn for de Tieso. Ĉiuj detaloj pri la strukturo de la kurso kaj la lanĉo de la projekto troviĝas en dokumento de UEA-ILEI (<https://www.ilei.info/agado/Esperanto-kurso-en-Senegalo.pdf>). La kurso komenciĝos la 19-an de septembro: lecionoj daŭros ĝis la 17-a de decembro, sed enplektiĝo en la laboroj de la 8-a AKE ankaŭ estas parto de la agado. Entute temos pri 45 instruhoroj plus aktivecoj. Laŭplane 20 homoj devos partopreni la kurson kiel lernantoj. La elektita instruonto launecese ricevos: 1) biletojn por vojaĝi al Senegalo; 2) loĝejon en Senegalo; 3) stipendion, por sinutrado kaj aliaj bezonoj, je la valoro de ĝis 2200 EUR. Interesatoj devas sendi sian kandidatiĝon per la kandidatighilo (<https://mallonge.net/Senegalo22>) aŭ rekte al la retadreso senegalo22@groups.io. La kandidatiĝo devas esti farita de la interesato mem kaj devas informi: plenan nomon (kiel en oficiala identiga dokumento); sekson (nedevice); naskighdaton; plenan loĝadreson (kun poŝtkodo, se estas); telefonnumeron, se estas; UEA-kodon, se estas; ĉu la kandidato havas pasporton kaj, se jes, emisiintan landon; ĉu la kandidato havas KER-ekzamenan atestilon aŭ alian Esperantlingvan atestilon kaj, se jes, je kiuj niveloj; mallongan priskribon de antaŭaj instruspertoj; kaj motivojn de la kandidatiĝo. La informojn ricevos ĵurio, kiu respondecas pri la elekto de la instruonto. Kandidatoj povos esti kontaktitaj por intervjuo kun la ĵurio, kiu okazos rete. Ne estas fiksa limdato por akcepto de kandidatiĝoj, sed la ĵurio povas fari sian decidon iam ajn dum la periodo ĝis la kurso, pro kio pli fruaj kandidatiĝoj nature ĝuos pli da ŝanco. La kurso en Dakaro celas ne nur helpi la laborojn ĉirkaŭ la 8-a AKE, sed ankaŭ fortigi la Esperanto-movadon en Senegalo. La tuta buĝeto de la kurso estas de 6000 EUR, kun parto destinita al informagado, cele al diskonigo de la kurso en Senegalo kaj de Esperanto mem. Donacoj por informado kaj por agado en Afriko bonvenas ĉe la fondaĵoj Informado (<https://uea.org/alighoj/donacoj/informado>) kaj Afriko (<https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko>) de UEA.

LA ESPERANTISTOJ HAVAS PROPAN SANKTULON!

La 4-an de marto 2022 en Vatikano papo Francisko prezidis la Publikan ordinaran konsistorion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj:

- beata Titus Brandsma, sacerdoto, karmelano, martiro;
- beata Maria Rivier, fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj de la Entempligo de Maria;

- beata Maria di Gesù (Carolina Santocanale), fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj kapucenaj de la Dipatrino de Lurdo.

La solena sanktproklamo okazos je la 5-a Paska dimanĉo, la 15-a de majo 2022. Ni, membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista aparte ĝojas, ke inter la novaj sanktuloj troviĝas la nomo de kaj nia membro kaj nia ĉiela patrono, Titus Brandsma! Li estas la unua Esperantisto kiu iĝis sanktulo!

Titus Brandsma (Anno Sjoerd Brandsma – foto en la PDF) naskiĝis la 23-an de februaro 1881 en Ugoklooster apud Bolsward kaj martire mortis la 26-an de julio 1942 en la koncentrejo Dachau. Li estis frisa karmelana patro, katolika sacerdoto, prof Espero Katolika 11/1985 per la teksto "La moderna martiro Tito Brandsma estis Esperantisto" oni mallonge skizas la vivon de p. Titus. La du-paĝan tekston mi aldonas.

Ankoraŭ estas prilaborata lia Esperanta-profilaĵo. Ni ja scias ke li aktivis en la katolika E-rondo en la unuaj jaroj de la ekzisto de IKUE. En la jarlibroj de IKUE, ni trovas lian nomon, ekz. jaroj 1926, 1928, 1931-32, 1938. Okaze de la 4-a jarkunveno de "Nederlanda Katoliko" (Nederlanda katolika E-Ligo), en 1913 en s'Hertogenbosch celebris la meson por la vivantaj kaj mortintaj membroj (v. EK 6.1913). Li recenzis la eldonaĵojn, kaj ankaŭ gvidis la Komisionon de legado kaj studado de "Nederlanda Katoliko" (1922). Li estis inter la organizantoj de la Kongreso de Nederlanda Katoliko ('s-Hertogenbosch, 1934), same inter la membroj de honora komitato kaj ankaŭ inter la partoprenantoj de la 19-a IKUE kongreso (1937, Hago). Do, ni povos konkludi, ke li apartenas al la pioniroj de la katolika Eo-movado. En la Virtualaj Tagoj de IKUE (2020) kaj Virtuala Kongreso de IKUE (2021) oni dediĉis atenton al la martiroj ligitaj kun la Eo-movado. Ni atenton donis al Sta Maksimiliano Kolbe, la ĉiela patrono de IKUE (pasintjare ni memoris 80 jarojn de lia artira morto) kiu ja ne estis mem esperantisto, sed bone komprenis la ideon kaj subtenis la lernadon. Ĉiu 14-a tago de la monato estas nomita "Kolbe-tago" okaze de kiu dum la virtualaj kunvenoj oni strebas pli bone ekkoni tiun sanktulon. Fine de la Virtuala Kongreso (14.-21.8.2021) estis proponite, ke en la jaro 2022 dum kiu ni memoras 80 jarojn de la martira morto de Titus Brandsma, estu aparta atento dediĉita al pli bona kono de tiu ĉiela patrono. Ĉiu 27-a tago de monato estas nomita 'Titus Brandsma-tago'.

Ĉiuj, kiu trovis informojn pri al Eo-agado de Titus, bv. tion komuniki al: kue.reto@gmail.com . La vivo kaj agado de Titus estu vojmontriloj por niaj vivoj kaj interhomaj rilatoj kaj por niaj streboj ke la mondo iĝu pli bona, pli paca kaj pli justa!

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!

Beh, bottone, pulsante, è poi lo stesso, no?

